

La NASKa Fasko


Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

london, la 1-an de Julio, 2013 • numero ses

Kio okazos hodiaŭ?

★8:30 atm – tagmezo: Lecionoj
Flowe, unua etaĝo

★2:00 – 3:00 ptm
Steĉjo prezentos
pri Budhismo
Flowe, unua etaĝo
(Vidu la priskribon dekstre!)



★7:00 – 8:00 ptm
Ludovespero
Flowe, unua etaĝo
(Vidu la priskribon dekstre!)

Anonco

Jen bona propono fare de Steĉjo: se vi reklamos (aŭ jam reklamis) TTT- aŭ retpoŝt-adresojn en via prezento, sendu ilin ankaŭ al la Fasko, por ke ni presu kaj disdonu ilin. Dankon!

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.


Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Steĉjo prelegos hodiaŭ pri budhismo

Kiel en kelkaj aliaj religioj, en la budhisma mondo oni trovas multajn diversajn skolojn. Malgraŭ tiu fakto, tamen, ĉiuj skoloj honoras la *Tri Juvelojn*: la Budhon, la Darmon, kaj la Sanghon. Por eĉ konsideri sin Budhano necesas pli ol konsento pri la instruoj de la Budho – necesas ankaŭ praktikado, ideale matene kaj vespere laŭ la viv-situacio.

En sia prezentaĵo je la 2-a en Flowe, Steĉjo preparolos la tri ĉefajn meditmetodojn kaj ni eĉ provos mediti, ĉanti mantron kaj deklami la faman Koro-Sutron.

*Sidu, trankviliĝu, kaj aŭskultu,
ĉar vi ebrias, kaj ni estas ĉe la
rando de tegmento.*
—Rumi



Venu kaj ludu kun ni!

Multaj esperantistoj ŝatas tabuloludojn; ĉu ankaŭ vi? Venu al la unua etaĝo de Flowe ĉi-vespere je la 7-a. Ne gravas, ĉu vi estas sperta ludanto, aŭ ĉu vi simple volas ekscii pri novaj ludoj. Se vi mem havas ludon kun vi, nepre kunportu ĝin kaj dividu kun aliaj!

Hoss kunportos kelkajn ludojn adaptitajn al Esperanto: *Skrablo* (similas al *Scrabble*TM), *Akordoj* (similas al la ludo *Apples To Apples*TM), kaj *Pictureka*TM. Estos ankaŭ ludoj faritaj en Esperanto mem: ekz. la bonega *Vorto-Mozaiko* el Japanujo.



La putrinta hakiltlenilo

de Francisko LORRAIN

Orientanoj havas plurajn esprimojn por nomi goon. Unu el ili estas “putrinta hakiltlenilo.” Strange, ĉu ne? Tiu nomo devenas el malnova ĉina legendo, kiun mi tuj rakontos al vi.

Lignohakisto nomata Wang Zhi [prononcu Ŭang Ĉe], juna kaj fortika, ofte vagadis malproksimen en la montojn, serĉante arbojn dignajn je sia hakilo. Iun tagon, esplorinte eĉ pli foren ol kutime, li perdiĝis.

Li iris tien kaj reen, serĉante sian vojon, kaj alvenis al senarbejo, kie du strangaj maljunuloj sidis ambaŭflanke de gotabulo kuŝanta sur ŝtono. La sinteno de la maljunuloj, ilia grandega aĝo, kaj lia propra pasio por goo igis lin alproksimiĝi. Li metis sian hakilon sur la grundon kaj tuj enprofundiĝis en la partion, kiu disvolviĝis antaŭ liaj okuloj. Ambaŭ ludantoj estis fakte senmortuloj, kiuj ludis sian preferatan ludon en la sovaĝa naturo, kie plaĉas al ili vivi.

Unu el la ludantoj donis al Wang Zhi daktilosimilan frukton por manĝi. Ĝin maĉinte kaj englutinte, li ne plu sentis malsaton, nek soifon. Li falis en trancon dum horo aŭ du, laŭ sia impresio. Kiam li vekigis, la du senmortuloj estis malaperantaj en la ĉielo.

Konfuzite kaj palpante sian barbon, li ekkonstatis, ke ĝi estis fariĝinta neimageble longa kaj blanka, kaj same liaj haroj. Li provis pluki sian hakilon el la grundo, sed la tenilo polviĝis, trae pu-



trinte.

Ege skuite, li tamen, iom post iom, pli-malpli renormaliĝis kaj, per la malrapida paŝo de la maljunulo, kiu li nun estis, li finfine retrovis sian vojon. Sed, atente observante ĉion, kion li vidis, ŝajnis al li, ke mensogis lia memoro, ĉar ĉio aspektis malsame. Reveninte al sia vilaĝo, kie ankaŭ ĉio ŝajnis ŝanĝita, Wang Zhi ekploreĝis. Lia tuta familio estis malaperinta, nekonata eĉ de la plej maljunaj loĝantoj.

Poeto kaj kortega funkciulo, la japano Ki no Tomonori aludis tiun legendon en

korpremaj versoj verkitaĵ ĉirkaŭ la jaro 900, je lia reveno hejmen post longjara servado en malproksima provinco:

Mi revenis hejmen.
Neniu amiko por goi.
Tiu fora loko,
Kie hakiltlenilo polviĝis,
Kiel ĝi fariĝis al mi kara!

En Oriento, la temo de la putrinta hakiltlenilo inspiradis verkistojn kaj poetojn ĝis lanuna epoko. [Fonto: revuo *Go World*, n-ro 69 (1993)]

Demandu al la Fasko: kio estas grits?

Demandu: En la manĝejo mi rimarkis, ke oni proponas por la matenmanĝo ion nomitan “grits”. Kio ĝi estas?

Respondu: Grits estas speco de manĝaĵo farita el muelita maizo. Ĝi estas de indiĝena deveno, kaj oni ofte manĝas ĝin matene en la sud-orienta parto de Usono. Nuntempe oni uzas maizon modifitan per alkalo, kiun oni nomas angle *hominy*, por fari grits.

Ili similas al aliaj kaĉoj faritaj el maizo en diversaj mondpartoj, ekz. *polenta*.

La vorto devenas de la Malnova Angla vorto *grytt*, kiu signifas “malfajna muelaĵo”. Originale ĝi rilatis al tritiko, pro tio ke maizo estis nekonata en Eŭropo.



Ĉu alia senintenca esperantaĵo?

DONATOS

Ne malproksime de la ŝildo *Sola* (kiu prezentatis hieraŭ) trovis ankaŭ la jena! La teksto estas tute bona – se nekutime kompakta – formo de la participa frazo “*estos donata*”. Sed ĝuste kio donatos... kaj al kiu? Ĉu la abundo de senintencaj uzoj de Esperanto apud ni kunmetitas nur per koincido, aŭ ĉu... aŭguratas komploto?